

# Esperanto-Informilo

66-a jaro

por Berlin kaj Brandenburgio (666)

n-ro 666, 02/2016 + 03/2016

## Saluton,

nun venis nova etapo de la preparado de nia informilo. Pro tempomanko nun Marc Hanisch entute rezignis finprepari ĝin. Ni ĉiuj danku al li pro la ĝis nun, eĉ eksterofice, farita laboro. Sed ne multe sencas havi informilon, kiu prezentas nur estintaĵojn.

Ĉar mi nun tute provizore transprenas la rolon de redaktanto, mi petas vian toleremon rilate al la aspekto. Memkompreneble mi tre ĝojus, se pli kapabla homo transprenus la taskon de redaktoro laŭeble baldaŭ, sed ni jam serĉis sufiĉe longtempe – bedaŭrinde sensukcese.

Ja ekzistus la ebleco liveri artikolojn al „Esperanto aktuell“, la oficiala organo de GEA, sed la informilo ankaŭ entenu internaĵojn, pri kiuj ne interesiĝas „eksteruloj“. Do, laŭ mia plej bona scio kaj emo mi provas liveri informojn perinformile, se eble ankaŭ regule.

Do, se trovas sin redaktemulo, tiu estas nun alvokita..

Tamen mi tre ĝojus pri artikoloj, kiuj venas de niaj membroj kaj gastoj.

La estrarkunsido decidis, ke minimume aperu reta informilo, kiun oni povas presi kaj disdoni al legemuloj.

Amike kaj samideane

Ronaldo

---

## Intervjuo kun Chuck Smith, la Esperantisto de la Jaro 2015

[En la januara \*Ondo vi legis\*](#), ke Chuck Smith, 36-jara usona komputisto, loĝanta en Berlino, estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2015. Li afable konsentis respondi la demandojn de *La Ondo*.

### Kiel impresis vin la informo, ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro?

Kompreneble, mi ĝojis kaj estis tre honorita ricevi la titolon. Verdire, post la lanĉo de nia kurso ĉe Duolingo, mi surpriziĝis kiom da vere eminentaj esperantistoj, ekzemple, Dennis Keefe (fondinto de lingvaj festivaloj) kaj Evildea (la plej aktiva jutubisto), kvazaŭ kampanjis, ke mi ricevu ĝin. Mi tre feliĉas, ke mi povis plibonigi la vivojn de tiom multaj homoj tutmonde ĉefe per mia agado por Vikipedio kaj Duolingo.

Same kiel Esperanto forigas lingvajn barojn, Interreto forigas distancajn barojn. Mi do tre kontentas esti parto de la nova cifereca revolucio ankaŭ por nia lingva komunumo. Rilate al tio, mi ĉiam diras, ke se oni volas kompreni, kion la homaro vere

---

---

bezonos kaj volos, oni devas mem vivi en la estonteco. Tial mi ĉiam provas frue adapti novajn teknologiojn por kompreni kiel oni interagas kun ili. ...

Pli multe kaj detale legu sub <http://sezonoj.ru/2016/01/smith-2/>.

Pli bone: aliĝu al Duolingo kaj kunlaboru!

---

## **Unika 89a SAT-Kongreso atendas vin, partoprenantoj jam el 11 landoj kaj 4 kontinentoj**

Tel. 05521-5983

E-poŝto: [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de)

Koran saluton al vi!

1) Multnombra aliĝo: Ĝoju pri la internacia kongreso meze en Germanio, do en Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo!

Atendos vin unika esperantipa programo kun multaj kulturaj, aktualaj kaj sociorilataj temoj.

Interesajn vizitojn kaj ekskursojn, ekz. al la bela grandurbo Hanovro, al la universitata urbo Göttingen ni ofertos al vi.

Informoj: <http://sat89.esperanto-urbo.de/>

2) Malmultekosta loĝado: Kiel kongreshotelo servos la fama kaj komforta esperantlingva hotelo "ZUM PASS" sub gvidoj de Teresa Liberska kaj Barbara Khan, kiuj bone regas nian lingvon. Vidu la prezentadmaterion pri tranoktado kaj servoj sube ĉe la paĝo

<http://sat89.esperanto-urbo.de/tranoktado/>

3) Allogaĵoj: Atendas vin vidindaĵoj kaj multaj Esperanto-servoj en Herzberg am Harz, la unua oficiala Esperanto-urbo en la mondo, kiu festos sian 10-jaran jubileon en julio 2016. Bonvenon!

<http://sat89.esperanto-urbo.de/ekskursoj/>

4) Ne forgesu: tuj antaŭ UK en Nitra okazos la SAT-kongreso en Herzberg. Eblos rekte veturi de tie al Slovakio.

Aliĝilon kun informoj vi trovas ĉe:

<http://sat89.esperanto-urbo.de/aliqxo/>

Je nomo de SAT-OKK salutas kore, Zsafia Korody kaj Petro Zilvar




---

## **Ponta Festo en Frankfurt (Oder) 2016**

Jam tradicie EABB partoprenis dum la 1-a de majo en la „Ponta Festo“ de la maldekstraj partioj kaj sindikatoj de Frankfurt (Oder) per informstano. Memkompreneble nia stano kiel kutime ankaŭ en la jaro 2016 informis pri Esperanto kaj la diversaj eblecoj de aplikado kaj lernado de la Internacia Lingvo. Eĉ ni ĉi-jare ofertis lernolibrojn kaj vortarojn, lingvajn ekemplojn kaj la Esperanto-kurson, kiu okazas ĉiujarde en la kafejo Słubfurt. Tiu kaj jena vizitanto kunprenis afiŝeton pri la kurso kaj ni nun atendu reeĝojn.

---

Ĉar mi klopodas prezenti ankaŭ novajn librojn, mi ekzemple surtabligis la ĵus eldonitan tradukon de „Heidi“ el Svislando. Bedaŭrinde ĉiam ne facilas elekti ekspoziciaĵojn kaj denove mi kunportis pli da libroj ol povis elteni la stando.

Al infanoj ni denove sukcesis transdoni aerobalonojn, memkompreneble kun faldfolio pri Esperanto kiel instrukcioj.

Denove la Esperanto-parto de la „Ponta Festo“ estis sufiĉe internacia, kvankam ne tre multaj Esperanto-amikoj trovis la vojon al Frankfurto.



La partoprenintoj venis el Pollando, Ruslando kaj Germanio. Specialan dankon mi ŝuldas al Andreo el Szczecin, kiu kunaranĝis la informstandon kaj diligente informis preter-pasantojn.

Do ni povis ĝui kaj demonstri internacian etoson kaj espereble sukcese varbi por Esperanto. Minimume okazis interesaj diskutoj kaj multaj homoj miris, ke Esperanto ekzistas ĝis nun.

Vizitis nian standon ankaŭ kursanino, kvankam ŝi deĵoris en alia stando samtage. Je la 18-a horo ni komune enpakis ĉiujn ekspoziciaĵojn kaj la restintaj partoprenintoj iris trans la ponton al la jam tradicia azia restoracio de Stübice. Jam nun mi invitas al la sekvontjara „Ponta Festo“ en 2017.

*Ronald Schindler*

## Esperanto in 12 Tagen

### Der schnellste Kurs für die Grundlagen

- Vermittelt die **wichtigsten 500 Wörter**
- **Ohne Anmeldung**: Einfach *Start* klicken
- **mobil-optimiert** für Smartphones
- nicht nur kostenlos, sondern auch **frei**

Der Kurs besteht aus **12 Lektionen**, jede davon mit

- einem Lesetext
- einer Grammatik-Erklärung
- und 3 Übungen.

Danach kannst du das Wichtigste verstehen und Sätze bilden, um **dich** grundlegend auszudrücken und zu verständigen. Probier es aus!

<http://learn.esperanto.com/de/>

# Jubilea Esperanto-printempo en Szczecin

Inter la 22-a kaj 24-a de aprilo 2016 denove okazis tre bone organizita aranĝo en la havena urbo Szczecin, nome la „Ŝĉecina Esperanta Printempo 2016“. Ĉi-foje la anoj de la filio Szczecin de la Pola Esperanto-Asocio celebris la 60-an datrevenon de sia fondiĝo. Tio estas grava kaj granda evento ne nur por ĉiuj esperantistoj de la urbo, sed ankaŭ por Pollando. La aranĝo nomiĝis ĉijare „Verda Ŝĉecino“ ĉar la organizintoj volis montri la plej belaj parkojn kaj naturvidindaĵojn, kiuj abundas en la urbo.

Aranĝejo kaj tranoktejo estis la Centro de Salesiana Societo (CSS), kiu disponas pri granda kaj bone ekipita festsalono kaj tranoktejoj.

Denove oni ofertis varian kaj riĉan programon, kaj la ĉeestintoj nur povas danki al la agademaj organizantoj pro la neforgeseblaj tri tagoj, dum kiuj ni rajtis partopreni.



Simple - la etoso elstaris.

Post mallonga malfermo kaj la komuna tagmanĝo ni komune vizitis la Ŝĉecinan Parkan - Tombejan komplekson tuj apud la CSS, pro kies grandeco ni tamen devis vojaĝi per tramo.

Alia kulmino de la unua tago estis profesia koncerto de tri instrumentoj kaj du voĉoj (la terceto „La Rocha“), kiuj ne nur prezentis klasikan muzikon, sed ankaŭ tiun de diversaj filmoj kaj kantistoj, ekz. de Luis Armstrong kaj Edit Piaf.

La dua tago komenciĝis per riĉa komuna matenmanĝo. Sekvis la tradicia komuna foto, kaj post tio la impresa prelego de Krzysztof Łobacz pri la 60-jara historio de la PEA-filio en Szczecin. Dum la prelego li devis konfesi, ke mankas granda parto de la kronologio, ĵus la 1980-aj jaroj ĝis 2007. Oni povis konstati, kiom gravas bona arkivo.

Per tramo kaj buso ni tuj poste vojaĝis komune al la impona placo kaj Parko de Kasproviĉ, kie rekte apud moderna amfiteatro eblis paŭzi kaj i.a. gustumi lokan bieron.

Post la komuna tagmanĝo en la CSS okazis solenaĵoj por honorigi membrojn de la ŝĉecinaj esp-istoj kaj transdoni membrokartojn. Mi uzis la bonŝancon por transdoni la saluton de EABB kaj ELB okaze de la jubileo per sufiĉe peza libro pri Berlino.

Sekvis interesa prelego de Ela Malik pri la salubraj aspektoj de uzado de abelaj produktoj. Kiel abelistino jam de pli ol 30 jaroj ŝi ne nur parolis pri mielo, sed ankaŭ pri diversaj aliaj avantaĝoj.

Venis la tempo, kiam Peter Kühnel raportis pri siaj impresoj de la vojaĝo al Nepalo, de kie li revenis nur antaŭ kelkaj tagoj. Li prezentis tre informriĉajn bildojn pri la homoj kaj pejzaĝoj de tiu fora lando.



Bedaŭrinde la tradicia konkurado de Kalemburoj ne povis okazi, ĉar ne anoncis sin sufiĉe da volontuloj.

Impona afero estis la koncerto de la Ŝĉecina Ĉambra Koruso, kiu komencis per la „Himno de Esperanto“, sed ankaŭ prezentis aliajn kanzonojn en Esperanto kaj en aliaj lingvoj. La pola lingvo

memkompreneble ne mankis.

Tuj post la komuna vespermanĝo komenciĝis nova kulmino, la koncerto de Birke kaj Bertilo, kiuj prezentis profesie el germana kaj sveda lingvoj tradukitajn kantojn kaj originalajn Esperanto-kantojn. Ĉiu ĉeestinto ĝuis la muzikon kaj la kantadon, kiujn oni povis analizi „ĉe bona guto“ dum la tradicia kafoklaĉo.



La dimanĉo komenciĝis per Sankta Meso en la malgranda kapelo en la sama domo. Kaj post la komuna matenmanĝo ni kolektiĝis antaŭ la CSS por busekskursi al la Smeralda Lago, kiu ekzemple dum aŭtuno vere aspektas smeraldkoloro pro la iama subĉiela minado de kreto kaj estas onidire la plej bela loko en Szczecin. Komune ni tie vizitis la elrigardejon „Polana Widok“, de kie ni havis bonan vidon al la urbocentro kaj la granda Dąbie-Lago. Reveninte de tie ni povis informiĝi pri la regiono ĉirkaŭ la Smeralda Lago kaj decidi, kiun vojon oni elektu por ekkoni la ĉirkaŭaĵon. Kelkaj suprengrimpis al la „Princa Kverko“, kiu bedaŭrinde ne plu aspektis tre majeste, dum aliaj sukcese ĉirkaŭiris la lagon.

Akurate ni denove kolektiĝis antaŭ la aŭtobuso, kiu reportis nin al la domo de CSS. Post la lasta komuna tagmanĝo okazis la adiaŭaj scenoj kaj la neevitebla fermo de la tre bela kaj impresoplena aranĝo ne sen promeso, ke sekvontjare oni denove renkontiĝu en Szczecin.

*Ronaldo*

## Die MIA-SERIO

Die Bücher der MIA-SERIO können **in Buchform** beim Esperanto-Buchversand bestellt werden. Die Kontaktadressen lauten:

**Schwanzner**, Dr. Wolfgang; Pfarrer-Seeger-Str. 9, D 55129 Mainz

Tel. 06136-46232 (abends 18.30 - 21.30 h) [Kein Fax!]

E-Mail: [informo@esperanto-buchversand.de](mailto:informo@esperanto-buchversand.de)

Internet: <http://www.esperanto-buchversand.de>

Die Bücher der MIA-SERIO können bei mir **als PDF-Dateien** erworben werden.

Mia Serurtruo	2,50 EUR	Mia Intensa Kurso	6,00 EUR
---------------	----------	-------------------	----------

Mia Lernolibro	5,00 EUR	Mia Gramatiko	5,00 EUR
----------------	----------	---------------	----------

Josef Schiffer, Wilstorfstr. 58, D 78050 Villingen-Schwenningen

Tel. 07721 - 58991 bzw. 0049772158991

E-Mail-Adresse: [Josef.Schiffer@t-online.de](mailto:Josef.Schiffer@t-online.de)

Viele Esperanto-Freunde haben sich die Seiten der Digitalbücher ausgedruckt oder im Copy Shop ausdrucken lassen, sie dann in Folien gesteckt und diese in einem Schnellhefter abgeheftet. So hat man die Lehrwerke in Buchform und gleichzeitig zum schnellen Aufrufen und Suchen auf dem PC/Notebook.

☺ Die Lehrbücher der MIA-SERIO enthalten Lösungen zu allen Übungen; daher eignen sie sich bestens zum **Selbststudium**.

Ein weiterer Vorteil ist, dass man nicht sofort ein dickes Lehrbuch kaufen muss, sondern dass man sich - je nach Begeisterung für Esperanto - nach und nach das nächste aufbauende Lehrbuch anschaffen kann.



---

# AVERTO!

En youtube nun troveblas filmetoj (videoj) de blinda homo nomata **Idji Xuan**.

En la filmeto "Esperanto kaj runoj", li montras tiun runon kiun uzis la nazia organizo SS.

Li provas kontakti e-istojn, sed pluraj trovis liajn mesaĝojn stranga kaj ne respondis.

Li ĉeestis la staĝon AŬTUNE 2015 en Greziljono kaj kondukis insulte, kverele, manipuleme.

Li aliĝis sub la nomo **Alain Schmitt** kun juna helpantino, loĝurbo F-54200 Toullu de li kontaktita e-isto enketis kaj trovis ke li estis guroo de eksa sekto [Minh Vacma](#) en F-57440 Algrange, kondamnita al prizonoj en Malto, poste 1 jaron en Francujo, pro mistrakto, kidnapo, mon-eldevigo.

**Estu do atentema**, se vi legas la nomon **Idji Xuan**

Mi sendas tiun ĉu mesaĝon al pluraj landaj listoj, kies lingvojn li parolas aŭ tradukigas.

---

[<bert.schumann@gmail.com>](mailto:bert.schumann@gmail.com)

---

## Persona nekrologo por amiko

Emociplenajn momentojn mi travivis, kiam la urno kun la ĉi-mondaj restaĵoj de *Ignat Florian Bociort* en trista mateno estis sinkigita en la teron.

Nur nun, kiam li korpe ne plu estas inter ni, mi iom post iom ekkonscias, kio mankos al mi kaj kiom li donis al mi vivante.

Mi ĉi-loke ne volas ripete elnombri liajn meritojn kiel diverskampa sciencisto kaj pensulo.

Klare antaŭ miaj okuloj staras ankoraŭ la festeto okaze de lia naŭdekjariĝo en familia, hejma rondo, ame prizorgata de lia edzino Uŝi. Malgraŭ kelkaj malhelpoj, ŝulditaj al la alta aĝo, li elradiis preskaŭ freŝan, gajan junecon, rerigardante al la trapasita vivotempo kun kontenteco kaj anima trankvilo. En postaj telefonaĵoj mi apenaŭ ion rimarkis de lia antaŭmortaj suferoj.

Mi unuafoje renkontis lin komence de la naŭdekaj jaroj de la pasinta jarcento en esperantista kunveno. Jam tiam reliefiĝis liaj bone bazitaj, firmaj konvinkoj rilate literaturon kaj filozofion, ĉiam klare formulitaj.

Mi ne ĉiupunkte konsentis kun li koncerne lian teorion pri la neevitebla progreso en la materia kaj idea mondo. Mi eĉ ekdebatis kun ĉi-teme en la UK en Prago. Sed mi plejofte devis cedi al liaj pli bone funditaj kaj pli lerte vortigitaj argumentoj.

La literaturan verkadon de mia edzino Lena Karpunina li kompetente kaj pozitive akompanis, ne ŝparante kun konstruiva kritiko.

Mi ne forgesos la multnombrajn reciprokajn invitojn, ekz. por komuna manĝado.

Elstaras la memoro pri unu el miaj rondaj naskiĝtagoj, kiam en ĉeesto de miksitaj gastoj li senreserve montris sian serenajn flankojn, gaje ŝercante kaj ekz. plenvoĉe kantante la Internacian en diversaj lingvoj, i.a. en la rumana. Sur mia bretaro staras liaj verkoj – eĉ iuj en la rumana lingvo, sed resumitaj en Esperanto. Jen tamen ankoraŭ speco de fizika ĉeesto.

---

Gerd Bussing

---

---

## Stato kaj estonteco de Biblioteko kaj Ĵaŭda Rondo

De proksimume duona jaro kaj parto de nia biblioteko kaj la Ĵaŭda Rondo havas sian lokon ne plu en la Esperantodomo en Lichtenberg, sed en mia loĝejo en Berlin-Charlottenburg. Pro siatempa urĝa neceso la translokiĝo devis esti sufiĉe haste efektivigita, kaj tio sukcesis danke al la klopodoj de pluraj helpemaj berlinaj esperantistoj en relative mallonga tempo.

Estis dekomence klare, ke tio povis esti nur provizora solvo. Nun venis la tempo por ekserĉi novan, pli taŭgan kaj laŭeble definitivan restadlokon por nia libraro. Kaj ankaŭ la Ĵaŭda Rondo trovu denove iun malprivatan kunvenejon.

Klare, ke tio nek povos nek devos esti realigita de unu tago al la alia.

Pri la libroj ne multo estas direnda. Sur mia bretaro troviĝas selekto de kelkcent, “espotekaj” kaj kromaj libroj, la ceteraj en aliaj, ne rekte alireblaj, sekuraj lokoj.

La improvizita, nestrikta ordosistemo tamen ebligas rapidan trovon de serĉataj libroj.

Elpruntoj estis ekstreme malmultaj, de tempo al tempo revene aldoniĝis kaj aldoniĝas libroj el diversaj fontoj. Kelkajn valorajn noveldonojn mi mem alaĉetis.

Ĝojiga novaĵo: la dumtempe “malaperintaj” libroj (krom unu) reaperis. Ili estis erare kuntransportitaj al alia loko.

Problemon konsistigas relative granda kvanto de neredonitaj libroj el la pasintaj jaroj. Sekve de ĥaosa listigo kaj mankantaj aŭ ne plu validaj adresoj kaj telefonnumeroj estas dubinde, ĉu ni sukcesos komplete reakiri ilin, kvankam intertempe kelkaj ja estis redonitaj. Por la estonteco necesas enkonduki severan reĝimon tiurilate.

La siatempe proponita kaj de la estraro aprobita t.n. biblioteka komisiono ĝis nun pro diversaj kialoj, ĉefe tempomanko, bedaŭrinde ne povis ekagi.

Al la Ĵaŭda Rondo dum la pasinta duonjaro venis preskaŭ precize 100 homoj diversnaciaj, kio egalas al modesta mezumo de po 4 en ĉiu el la c. 25 kunvenoj (vd. sube).

La rondo (fondita en 1978), kiu jam plurfoje ŝanĝis sian aranĝejon, laŭtradicie estas malferma praktikada babilrondo. La partoprenantoj povas laŭokaze proponi temon.

Jen malgranda statistiko:

Kunvenoj de la Ĵaŭda Rondo de junio ĝis decembro 2015 entute: 25;

Partoprenintoj sume: ĉ. 100;

Partoprenintoj mezume en ĉiu kunveno: po 4;

Maksimumo 10 (8-a de aŭgusto);

Minimumo: 1 (10-a de decembro);

---

---

Viroj: 8; virinoj: 7

Laŭ landoj:

Germanio: 21 (inkluzive de eksterlandanoj loĝantaj en Germanio)

Usono 3

Belgio 2

Ukrainio 2

Francio 3

Hungario 1

Hispanio 1

Meksikio 1

---

*Gerd Bussing* (stato de januaro 2016)

---

## Somera festo sur Esperanto-Placo en Berlino

ELB kaj EABB en kunlaboro kun societoj kaj publikaj instancoj en Neukölln kaj ĉirkaŭ la Esperanto-placo invitas al somera festo laŭ jam konata tradicio por la 14-a de septembro, 15:00 h.

Je la 19-a de julio 15:00 jam okazu la unua parto, nome agado por flegado kaj plantado sur la Esperanto-placo okaze de la kampanjo „Bele kiel ni – tiel ni volas nian Novkolonjon“ (<http://schoen-wie-wir.de/#Kampagne>). Bonvolu veni amase por plibeligi „nian“ placon.

---

## Somera festo en Michendorf

Antaŭ pluraj jaroj ĝi estis tradicia festo en la Esperanto-domo de Michendorf. Peter Kühnel intencas revivigi tiun tradicion kaj pro tio invitas al kradrostado, trinkado, ludado kaj ripozado. La evento okazu 2016-09-04. Detala invitilo sekvos ĝustatempe.

---

## SEFT invitas

SEFT okazos en 2016 de la 5a ĝis la 14a de aŭgusto. Pli da informoj, se vi scivolemas:

[http://esperanto-nb.de/seft/seft\\_eo.html](http://esperanto-nb.de/seft/seft_eo.html).

---

## Kibo-Ludado invitas

Kial ludi sole en la loĝejo? Ne necesas, simple venu al

Eiscafé Kibo

Transvaalstraße 13

13351 Berlin (Wedding)

(publika transporto: U6 Seestraße aŭ Rehberge),

tie vi povas ludi serioze aŭ ne serioze per interesaj ludoj en esperantista etoso. Ni renkontiĝas unufoje monate, ĉiam sabate ekde la 14-a horo posttagmeze.

Ĉiam oni povas esti scivolema, kiujn ludojn kunportas la organizantino Jessica Grasso aŭ

---



aliaj kunludantoj. Kiun ludon mi mem plej volonte prezentus al la komunumo por entuziasmigi la ĉeestantojn? Ĉu sekvontfoje venos eksterlandaj gastoj kun pli mojosaj ludideoj?

Tio estas demandoj, kiujn oni povas starigi ĉiam denove.

Unu el la plej ŝatataj ludoj lastatempe estas „Tabuo“ en Esperanto, amuza lingvo/vortludo kiun oni povas ludi en grandaj teamoj.

La ludantoj renkontiĝas enmeze de aliaj homoj en la granda ĉambro de la publika kafejo kaj de tempo al tempo ankaŭ fremdaj homoj per tio ekscias pri la Internacia Lingvo Esperanto. Eĉ povas okazi, ke ĝis nun nekonata esperantisto venas en la kafejon, kiun kaptas la fajrero de ludado!

Jam Friedrich Schiller skribis grandegan eseon pri la ludado kaj ties neceso por la evoluiĝo de la homaro. Li titolis tion ludinstinkto.

Do venu kaj ĝisfunde ĝuu la ludadon! Sed vi ne restos sola, regule la luda komunumo havas pli ol 10 partoprenantojn, sed ĉiam bonvenigas novajn.

Dum julio ne okazos la kutima ludoposttamezo en kafejo, ĉar Jessica organizas ludosemajnfinojn inter la 29-a de julio kaj la 1-a de aŭgusto 2016. Pli da informoj legeblas ĉe ĝia retpaĝo: [www.abeloabeloabelo.wordpress.com](http://www.abeloabeloabelo.wordpress.com). Oni nepre devas antaŭe aliĝi per retroŝtmesaĝo al [abeloabeloabelo@gmail.com](mailto:abeloabeloabelo@gmail.com)!

Post tio, la datojn de la sekvaj Kibo-ludadoj vi jam nun povas noti: 2016-08-20 kaj 2016-09-17.

Ronaldo

## Esperanto-Kiosko en Berlino

dum preparo de mia unua urba gvidado ĉi-jare mi surprizite rimarkis ke la kiosko „esperanto“ en Simon-Dach-Straße, jam kelkajn jarojn ekzistanta, nun tre lukse informas pri Esperanto kaj bonvenigas la preterpasantojn en kelkaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Ĝi situas en la suda parto de Simon-Dach-Straße, kie ankoraŭ ne troviĝas tiom multaj restoracioj kiom en la norda parto. Tamen turistoj ankaŭ ĉi tie preterpasas. Eble estus bone, kontakti kun la posedanto. Ekzistas laŭdire du pliaj kioskoj kun la nomo „Esperanto“ en Kopernikusstraße kaj Bänischstraße.



Fritz Wollenberg

## Publika estrarkunsido de EABB/ELB okazis

La protokolo de la estrarkunsido je la 04-a de junio 2016 troveblas sub la adreso: <https://esperanto.berlin/wp-content/uploads/2016/06/protokolo-estrarkunsido-EABB-2016-06-04.pdf>

Bedaŭrinde ĝi ekzistas nur en la germana lingvo.

---

## Zamenhof-festo 2016

Ni invitas ĉiujn al agrabla kunestado dum la ĉijara jarfina, Zamenhofa kaj librofesto:

Loko: Kietzspinne - Oranĝerio, Schulze-Boysen-Straße 38, 10365 Berlin

Tempo: Vendrede, la 25-an de novembro 2016, 15:00\*-20:00 h.

Ni serĉas interesajn programerojn, bv. skribi viajn proponojn al

[RonaldSchindler@web.de](mailto:RonaldSchindler@web.de)

---

## Preparado okaze de la omaĝo de la 100-a datreveno

En la sekvonta jaro okazos jubilea aranĝo okaze de la 100-a datreveno de la mortotago de L.L. Zamenhof. Por la preparado de la festo fondiĝis preparkomitato, kiu unuafoje kunvenis je la 4-a de junio 2016 en Berlin, Katzbachstraße 25.

Oni diskutis pri eblaj lokoj kaj programeroj. La evento okazos en kunlaboro kun GEA. Ni ĝojas pri proponoj por la programo.

---

Ĉu vi povas helpi nin por disvastigi nian Ekologian projekteton?

### PRI NIA EKOLOGIA PROJEKTO

Karaj amikoj; Ni Verda Stelano-Klubanoj el Kongo ege ĝojas ricevi vian ŝatatan respondon pri nia projekto. Kompreneble Esperanto estas belsona lingvo kiu unuigas la mondon. Nu, pri via demando, kial ni volas planti arbojn en nia komunumo Kiwanja. Ĉi tie estas teritorio, kie la enloĝantoj spertis multnombrajn militojn de 1996, 2008, 2012.... Tiuj okazaĵoj malfeliĉaj bremsis la disvolviĝon en nia distrikto Rutshuru. Due, pro tiuj ĉi preskaŭ 80 % de la popolo loka fariĝis malriĉuloj. Trie, la konga registaro ne prizorgas salajri aŭ subteni siajn ŝtatlaboristojn. Eĉ la militistoj ne bone estas salajritaj, foje tiuj ĉi prirabas la popolon pro manko de manĝaĵo. Kelkfoje, survoje ili prirabas la komercistojn kiuj iras en vendejojn. Komprenu, ke en nia loko la malriĉeco estas altega. Ĝenerale la eŭropanoj, azianoj .... supozas, ke en Afriko ĉio estas en ordo; sed male - ne estas vera. Kompreneble estas iuj afrikaj landoj, kiuj bone funkcias, sed estas aliaj, kiuj tre suferas pro kriza ekonomio. Pro tiu kriza ekonomio, kiun ni travivas, kaŭzas danĝeron en la tuta distrikto. Ne laboroj por gajni ion por manĝi, lernigi infanojn en lernejoj,.... Tio estas, la popolo atakas arbojn de la parkoj pro manko de laboro. Reveno al nia projekto: Nia komunumo Kiwanja estas loko, kiu varmiĝas ĉar ĝi situas en la ebenaĵo kaj ne surmonte. En tiu komunumo ne estas sufiĉe da arboj por doni sufiĉajn ombrojn kaj freŝaĵojn. Tage kaj nokte ne estas diferenco ĉar la varmeco regas de junio ĝis aŭgusto. Ĉar nia registaro ne plu prizorgas nin, ni - membroj de V.S.K. - decidis fari tiun projekton por ke ĉiu loĝanto havu pli malpli 5 aŭ 6 arbojn. Ĉiu familio de tiu komunumo povos planti tiujn ĉi sur sia terpeco. Per tiu metodo okazos redukto de la varmeco. Ĝuste, la projekto estas kosta, sed vi povas serĉi bonvolulojn, kiuj povos kontribui eĉ duonon aŭ trionon de tiuj ĉi kostoj. Ni povos uzi ĝin sen malfacilaĵo. Aldone: Mi estas artisto kaj pensas, ke vi jam vidis miajn bildojn eble en la reto. La prezo dependas de la grandeco. Ĉu vi jam vidis ekzempleron? Artaĵo de longeco de 23 cm kaj larĝo de 18 cm kostas 20 \$ inkluzive sendokostoj. Artaĵo de 46 cm x 36 cm kostas 40 \$ inkluzive la sendokostoj.

Kore via amiko Honore Sebuoro

(Kontakto: [honsebn@gmail.com](mailto:honsebn@gmail.com))

---

## La 15-a Novjara Renkontiĝo (NR)

ĉi-jarfine okazos de la 27-a de decembro 2016 ĝis 3-a de januaro 2017, mardo ĝis mardo en Saarbrücken, samtempe kaj samloke kun la 8-a NIS ([Novjara Internacia Semajno, NIS](#)), la programo por junuloj.

NR do denove estos **tuj apud Francio**, kion certe bonvenigos aparte la francoj :) ja fakte Saarbrücken estas landlima urbo.

Ankaŭ suda Germanio kaj Svislando denove pli proksimas.

Ni do esperas, ke multaj el vi eluzos la fakton, ke ekzemple la trajna distanco inter Parizo kaj Saarbrücken estas malpli ol du horoj.

Jen la [informa paĝo](#) kun [aliĝilo](#).

**Internacia etoso, prelegoj, kursoj, koncertoj, ekskursoj...**

Do, multaj kaŭzoj por veni kaj reveni al NR/NIS... :-)

Ĉu vi ŝatos festi kun ni novjare en internacia rondo? Do venu al la 15-a NR!

Ĉion bonan al vi, belan someron kaj esperinde ĝis revido dum [NR/NIS](#), por la organiza teamo de NR/NIS

Lu Wunsch-Rolshoven

EsperantoLand

<http://www.esperanto.land>

Tel. +49 - 30 - 685 58 31

+49 - 173 - 162 90 63

### Kontaktoj

Pro manko de spaco bonvolu viziti <http://esperanto.berlin> por aktualaj datoj.

#### Germana Esperanto-Asocio

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin

tel.: 030 510 629 35, infozentrum[ĉe]esperanto.de

IBAN DE32508519520040114571, BIC: HELADEF1ERB

#### Esperanto-Asocio Berlin-Brandenburgio kaj Esperanto-Liga Berlin e.V.:

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin, eabb[ĉe]esperanto.de

IBAN: DE45 1203 0000 1020 2018 67, BIC: BYLADEM1001

Prezidanto: Ronald Schindler

#### EsperantoLand e.V.

Lu Wunsch-Rolshoven, tel.: 030 685 5831, esperantoland[ĉe]esperantoland.de,

[www.EsperantoLand.de](http://www.EsperantoLand.de)

#### Esperanto? Plenbuŝe! - praktikada tablorondo

Philippe Beaudonnet, tel.: 030 217 562 33, philippe.beaudonnet[ĉe]gmx.net

#### Ĵaŭda Rondo

renkontigejo: Knobelsdorffstraße 29/31, 14059 Berlin

#### Grupo Lietzensee

Hans Moser, tel.: 030 8621411

### Esperanto-Infomilo por Berlino kaj Brandenburgio estas la oficiala organo de

#### Esperanto-Asocio Berlino-Brandenburgio r. a.

##### Eldonas/Herausgeber:

Esperanto-Asocio Berlino-Brandenburgio r. a. Esperanto-Verband Berlin Brandenburg e. V.

##### Responsas/V.i.S.d.P.:

Ronald Schindler, prezidanto

Katzbachstr. 25 · 10965 Berlin – [www.esperanto.berlin](http://www.esperanto.berlin) · eibb [ĉe] esperanto.de

##### Enpaĝigis/Satz:

Marc Hanisch · Farita per Scribus (<http://scribus.net>)

**Litertiparo/Schrift:** Gentium (<http://scripts.sil.org>), PT Sans (<http://www.paratype.com/public>)

En la artikoloj esprimiĝas nur la opinioj, deklaroj, rekomendoj ktp. de la unuopaj aŭtoroj, ne de la asocioj, estraroj ktp. aŭ de la responsulo, krom se io alia estas eksplicite indikita.

*La redakta limdato por la venonta numero estas la 1-a de septembro 2016.*

**Loko por viaj notoj kaj proponoj:**